

Heinrich Heine,
En Majo

tradukita de Manfredo Ratislavo

En Majo, kiam ĉiuj
Burĝonoj malfermiĝis,
La amo kiel floro
En mia kor' estiĝis.

En Majo, kiam ĉiuj
Birdetoj sin aŭdigis,
Al ŝi deziron mian
Sopiran mi sciigis.

*Traduko de la Germana poemo "Im Mai" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1982-11-14.*

MR-002-4 / Arg-203-403 (2004-04-05 20:37:00)

La poemo troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I.

Heinrich Heine,
En la mirinda bela Maj'

tradukita de Kálmán Kalocsay

En la mirinda bela Maj',
dum sin burĝonoj fendis,
en mia kor' la amon
mi disvolviĝi sentis.

En la mirinda bela Maj',
dum birda tril' ne ĉesis,
al ŝi sopiron mian
konfide mi konfesis.

*Traduko de la Germana poemo "Im Mai" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo, *1911 - †1976).*

Arg-203-1082 (2010-05-26 12:08:05)